
# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 2 2021


## BESTOJ HAVAS RAJTOJN KAJ INTERESOJN, KIUJ DEVAS ESTI PRIATENTITAJ OKAZE DE DIVORCO AŬ SEPARO DE TIES MASTROJ

La pasintan 2-an de decembro, la Hispana Parlamento aprobis leĝon kiu agnoskas rajtojn por bestoj. Laŭ tiu nova leĝo, bestoj estas konsiderataj kiel sentemaj estaĵoj, kiuj ĝuas rajtojn kaj interesojn kiuj estas nepre priatentitaj. Ekzemple: se paro posedas beston kaj ili divorcas aŭ decidas separon, juĝisto devos deklari kiu estos la mastro de la besto, ĉiam post konsideri ties interesojn.



*Tuco* estis ĉefrolulo okaze de plendo antaŭ hispana tribunalo.

Lastatempe hispanaj tribunaloj juĝis okaze de procesoj rilataj al posedo de hundoj. Ekzemple, la kazo pri *Tuco*. En la jaro 2018 la leĝa propietulo de hundo iris en Meksikion por sekvi studojn. Do, li decidis lasi sian hundon *Tuco* al amikino por ĝia bontenado. Laŭ la akordo tiu prizorgado devos daŭri nur unu monaton, tamen la vojaĝo plidaŭriĝis kaj la junulo revenis en Hispanion post ses monatoj. Dum tiu tempo li ne sendis monon por la bezonoj de la hundo, li ankaŭ ne kontaktis kun la amikino por interesiĝi pri la besto.

Kiam la junulo revenis, li depostulis la hundon al amikino, tamen ŝi rifuzis la peton, do la afero iris en juĝejon. Laŭ la junulino, post tiuj ses monatoj ekiĝis sentemaj rilatoj inter besto kaj nova mastro, kiuj ne povas esti forlasitaj, eĉ se la antaŭa posedanto revenas kaj depostulas ĝin.

Unuamomente la juĝisto konsideris, ke la leĝa propietulo estis la junulo, do la hundo devus esti denove havigita al li. Tamen, post apelacio, supera tribunalo juĝis ke, efektive la rajtoj kaj interesoj de la hundo devas esti agnoskataj kaj sendube ĝi ĝuis pli daŭrajn rilatojn kun la junulino ol kun la antaŭa mastro. Tiel, fine *Tuco* restos kun tiu kiu prizorgis ĝin.

# *Vorto de la Semajno*

**Abrogi** (tr): Nuligi leĝon aŭ dekreton fare de la rajtigitaj instancoj.


Temas pri vorto esprimanta similan ideon kiel *"aboli / abolicii"*. Tamen, ĉi lasta povas esti aplikata ne nur al leĝo sed ankaŭ al kutimo, male *"abrogi"* nur rilatas al leĝoj kaj ĉiam fare de oficialaj instancoj post la sekvo de preskribita proceduro.

• *La registaro aprobis la abrogon de la leĝo pri sekureco ĉar kelkaj artikoloj ne respektis la homajn rajtojn.*



La pasintan monaton novembron la bolivia parlamento decidis la abrogon de leĝo kontraŭ mon-lavado.

Dum la monato januaro 2022 aperos nova numero de JURA TRIBUNO INTERNACIA, oficiala organo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se Vi deziras kunlabori kun ĝi per redaktado de eseo, artikolo, mallonga informo, ktp, ne hezitu kontakti kun ni.




Internacia Jurista Esperanto-Asocio www.esperantojuro.org jurista@esperanto.ac